


KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



estas la lingvo por ni!

Kornjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

2004

Kiel Spomenka Ŝtimec, konata e-verkistino iĝis esperantistino
"Dek tagoj de kapitano Postnikov" – historia romano de Mikaelo Bronŝtejn
verkoj de niaj legantoj — gramatiko serioze kaj amuze — neelpensitaj
historioj — tempo kaj homoj — aforismoj — anekdotoj — ripozejo
korespondu!

3

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzcr, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Viŝnja Brankovič

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckevagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Ĉiu nova kajero de "K" portas ion novan por via atento. Ne estas escepto ankaŭ tiu ĉi 3-a numero.

Spomenka Štimec, konata esperanta verkistino kaj movada aktivulino priskribas sian esperantistigon en formo de beletra rakonto pri si mem.

"Dek tagoj de kapitano Postnikov" – freŝeldonita historia romano de *Mikaelo Bronŝtejn* gvidos vin en la pioniran epokon de Esperanto-movado, al eventoj kaj aventuroj antaŭcentjaraj, kiujn la aŭtoro detale esploris kaj lerte priskribas.

"Verkoj de niaj legantoj" kiel ĉiam prezentas originalajn kaj tradukitajn prozaĵojn kaj poeziaĵojn, kiujn legantoj de nia revuo provas verki. Inter ili estas amuzaj rakontoj de *I. Belousov* kaj *L. Burgar*, kaj poezia debuto en "K" de *Vladimir Vronskij* (Rusio). Ĉi tie vi legos ankaŭ poemon de jam konata al vi aŭtoro el Italio *S.E. Bullo*.

Ĉe la gramatikaj paĝoj estas utilaj kaj vere "Bonaj konsiloj al lernantoj de Esperanto" de *Vladimir Opletajev*, kiu estas profesia instruisto de fremdaj lingvoj (Rusio).

Por la rubriko "Tempo kaj homoj" sendis siajn tradukojn A. Kalačova (Rusio). En "Neelpensitaj historioj" estas ankaŭ nova rakontanto -- *David Henderson* el Usono, lin najbaras nia malnova legantino kaj aŭtoro *G. Martin* el Francio kun vere sprita teksto pri virinoj.

La finajn paĝojn de la revuo ligas inter si unu temo – *logiko*. Jam delonge ne aperadis en "K" enigmoj. Ĉi-foje ni decidis ŝtopi tiun breĉon kaj prezentis ilin sur du antaŭlastaj paĝoj, kiuj ricevis nomon *ripozejo*, ĉar somere certe troviĝos tempo por ripozo kaj ludo. Plej interesa certe estas krucenigmo "Araneo" de konata enigmisto *Viktor Alikin* (Rusio).

Dezirantoj korespondi serĉu plumamikojn laŭ siaj preferoj sur la dorsa kovrilpaĝo, kiel kutime.

La redakcio deziras al vi agrablan someran ripozon kaj atendas verkojn pri viaj somercaj vojaĝoj kaj impresoj!

KOMENCANTO

2004 numero 3 // (47) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

Sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loglokojn.

Spomenka Ŝtimec — talenta verkistino, kiu verkas Esperantan prozon; konata esperanta aktivulo kaj funkciulo de UEA, kunaŭtoro de la fama lernolibro "Zagreba metodo".



...mi marŝas sur tiu vojo, ne ĉesante ĝui la vastajn eblojn de Esperanto

Sendita letero el Japanio

fragmento el verko de S. Ŝtimec "Geografio de miaj memoroj"

Nian unuan renkontiĝon mi ne memoras. La poŝtisto ĉiam venadis je tagmezo. Mi senŝeligis terpomojn. La kuirejo odoris je boligataj kolbasoj. La granda vek-horloĝo sovaĝe tiktakis. Necesis gladi la nigran lernejan kitelon. Laodoro elvaporis el ĝi, dum mi tuŝis ĝin per la gladilo. La Balkanajn Militojn mi ne finlernis. Eble ne estos mia vico por ekzameniĝi hodiaŭ. La vaporo plidensiĝis. Certe la gladilo estas tro varma. Ĝis la aŭtuno 1912 la balkanaj ŝtatoj Serbio, Bulgario, Greklando kaj Montenegro eniris aliancon kontraŭ Turkio.

Sonorado ĉe la pordo. La poŝtisto tenis en la mano leteron. La letero aspektis aliplaneda. Mia nomo estis sur ĝi. La gladilo elsendis sian etan vapomubon.

Mi ne havis paciencon por serĉi tranĉilon sed avide ekŝiris la leteron. Zigzagis mia scivolo laŭ ĝia rando.

Estimata sinjoro!

Estimata? Tiu vorton mi ankoraŭ ne lernis. Mi ne komprenis. Vortaron mi ankoraŭ ne aĉetis. Mi estis ĉe la sesa leciono. Kolombo estas birdo. Leono estas besto.

Ĉu sinjoro? Mi ne estas sinjoro. Mi estas knabino. Mi havas dek ses jarojn. La instruistino preferas aŭdi "Mi estas deksex-jara".

Kutime skribis la avino, ke ni aĉetu cepŝosetojn por ŝia ĝardeno. La ĝeamikoj de la patro sendadis tedajn salutojn de la marbordo. Aĉaspektaj novjaraj kartoj alvenadis regule. Sed ĉi-foje nek cepomendo, nek marsaluto.

— Ĉu el Japanio? — miris la panjo.

Dika silento regis en la kuirejo dum mi legis. La legado daŭris. Dum la legado mi estis je alie. Ŝi sentis tion. En la lasta linio mi revenis. Estis la kuirejo ĉirkaŭ mi, la kolbasoj odoris, necesis fingladi la dekstran kitelmanikon. Neniām plu mi reprenis la fadenon, kio okazis kun la balkana alianco en la aŭtuno 1912.

— Kiu skribas al vi?

Iu sinjoro, esperantisto el Japanio.

La aliaj leteroj estis distraĵoj al la familianoj. Komunaj scioj, komunaj mesaĝoj. Tiu onklo estis nur la mia.

Panjo scivole rigardis al mi. Sekretumon mi ŝatis.

La papero en mia mano estis diafana. Ĉe la subskribo ruĝa kvadrato kun strangaj strioj, kiujn mi poste konos kiel sigelon.

Tiu onklo estos nur la mia. Bela sento de aparteno. Sen mia helpo neniu en la familio povus kompreni tiun leteron. Plezureto.

La nekonatajn vortojn mi elkopiis. "Estimata" montriĝis partecipo de "estimi".

Kiam la instruistino demandis, kiu ŝatus aĉeti Esperanto-vortaron mi alte levis la manon kun du kunpremitaj fingroj. Poste mi ekscios, ke en aliaj landoj, se oni malfermus tiujn du fingrojn, venko-sento esprimiĝas.

Panjo malfermis sian nigran monujon kaj, nenion suspektante, donis al mi monon por la vortaro. Ŝi ne sentis, ke jen nun mi ekglitas for, al la alia bordo, kie aliaj parencoj atendas...

Mi komencis lerni Esperanton kiam mi estis 16-jara knabino. Gimnazio en kiu mi lernis (en urbo Varazdin, Kroatio) ofertis post lecionoj - kurson pri Esperanto. Mia instruisto pri matematiko lekcias pri Esperanto multe pli sorĉe ol pri matematiko. Plaĉis al mi la ludelementoj de la lingvo: oni mem povis kunglui la vortojn kaj la lingvo funkciis. Fascinis min ideo pri Universala Kongreso, kie renkontiĝas homoj el diversaj mondpartoj kaj komprenas unu la alian senĝene per la lingvo, kiu egale apartenas al ĉiuj.

Budapeŝto 1966 donis al mi tiun sperton. Ĝi estis pli emociiga ol rakontoj de instruisto. Pro tiu etoso mi akceptis la mucidan etoson de la urba Esperanto-Klubo. La plej gravan rolon por mia lingva perfektigo havis korespondado. Mia Esperanta onklo el Japanio, kiun mi akiris post la unuaj lecionoj, per la helpo de instruisto, ĝis hodiaŭ restas mia plej grava Esperanta amiko. Baldaŭ 40-jaran amikecon ni festos!

Kiam mi ekstudis en la ĉefurbo, mi ekfrekventis Studentan Esperanto-Klubon en Zagrebo. Fascinis min etoso klera kaj gaja. Tie mi renkontis mondvojaĝanton Tibor Sekelj. Li montris al mi kio estas Esperanto. "Pli gravas praktiko ol cenhora prediko" - estis lia pensmaniero pri Esperanto. Mi decidis sekvi lin. Kaj ankoraŭ hodiaŭ mi marŝas sur tiu vojo, ne ĉesante ĝui la vastajn eblojn de Esperanto.

*Karaj legantoj! Ĉi foje ni prezentas al vi
jus aperintan historiam romanon de konata nun-
tempa verkisto el Rusio Mikaelo Bronŝtejn.*

*Kiel aperis ideo verki la romanon kaj kiel
ĝi poste realiĝis, tre interese rakontas la aŭtoro
mem. Ni esperas, ke tra leginte tiun ĉi verkon, vi
malkovros por si multon novan en la historio de E-
movado entute kaj ekscios pri multaj historiaj even-
toj en rusia Esperantujo en la komenco de la 20-a
jarcento.*



La aŭtoro devas diri ke...

Fakte laboro pri la romano komenciĝis ankoraŭ en 1978, kiam havante la ideon verki rusingvan biografion de L.L. Zamenhof mi ekstudis lian verkaron... La studado daŭris dum tri jaroj kaj lasis kvar kajerojn da elkribitaj citaĵoj, kiujn mi opiniis bezonataj por prezenti la Majstron. Sed du-tri prudentaj personoj fridigis mian kapon, dirante ke neniam mi sukcesos publikigi en Sovetunio biografion de Zamenhof, almenaŭ pro lia junaĝa cionismumado. La personoj certe estis pravaj. Por pli fridiĝi mi forveturis trans la Polusan Cirklon kaj laboris tie dum pluraj jaroj, komplete forĵetinte la ideon pri Zamenhof-biografio.

... Pri Aleksandr Postnikov mi eksciis eĉ pli frue. En 1976 mia Instruisto Andreo Rogov, veninte al SEJT-18 (Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) en Tihvin, donacis al mi tre valoran antikvaĵon. Ĝi estis "Universala Ĵurnalo", aperinta en 1911 en Peterburgo. En la kajero mi trovis kelkajn sciigojn pri la unua Kongreso de Ruslandaj Esperantistoj kaj komunan foton de la kongresanoj. Meze sidis mem la Majstro, kaj dekstramane de li - alta, svelta lipharulo en oficira uni-

formo - kapitano Aleksandr Postnikov. Preskaŭ samtempe mi kaŝe ricevis de mia ĉeĥa korespondamiko libron, tiutempe malpermesatan por enporto Sovetunion - "Esperanto en Perspektivo". La libro i.a. enhavis du-aŭ trifrazan informon pri la juĝproceso de Postnikov. Nur tion - sed ĝi estis sufiĉa por inciti mian scivolemon.

Post fino de mia nordumado mi revenis al la konstanta loĝloko en Tihvin, sed evidentiĝis, ke mi estas veninta ne en Sovetunion. Estis jam alia lando - stranga, ne tre bonanima, sed almenaŭ pli libera, ol tiu de mia naskiĝo. Subite malfermiĝis la landlimoj, kaj mi ekvojaĝis, avide kolektante la impresojn. Subite estis permesita eldonado de esperantlingvaj libroj, kaj mi elkestigis la akumulitajn verketojn. La nova etoso aktivigis, certe, ankaŭ mian esploradon pri Postnikov, kaj en 1997 mi prezentis ĉi-teman prelegon dum la Faulhaber-semajnfino en Elspeet (Nederlando). Mi bone memoras, ke ĝuste tiam, dum la prelego, dank'al iu repliko de Ed Borsboom, venis mian kapon la penso pri io simila en la karakteroj de la du personoj, kies vivojn mi esploris. Eble kelkaj dogmemaj esperantistoj trovos mian opinion tro aroga, sed ĝi estis kerna por ekverko de la romano.

Ambaŭ ili - Zamenhof kaj Postnikov estis aventuristoj! Kiam mi estis certiginta nun mem pri tio, mi komprenis, ke la kvar kajeroj de Zamenhof-citaĵoj, polvokovritaj post la dudekjara kuŝado, devas finfine lasi la ŝrankokeston...

Plejmulto de la roluloj estas personoj, reale vivintaj en tiu belega epoko antaŭjarcenta, kiu samforte logis al Esperanto generalojn, ministrojn kaj malriĉajn intelektulojn. El inter la plej gravaj roluloj nur mia ŝatata detektivo Modest Skipidarnikov kaj la neesperantistaj amikoj de Postnikov estas fikciaj personoj. Ankaŭ plejmulto de la eventoj, pri kiuj rakontas la romano, sendube estas fakte okazintaj en la reala vivo. Kredu min, ke ankaŭ plejmulto de la dokumentoj, prezentitaj en la romano, estas aŭtentikaj.

Certe, enestas kelkaj aŭtoraj libervolaĵoj. Tamen, ĉu post cent jaroj vere gravas la fakto, ke generalo Sebert, kies nomon oni trovas en la listo de la kongresanoj, ne venis al Vaŝingtono pro malsano? Ja el la korespondado inter Zamenhof kaj Sebert mi scias, ke la lasta havis fortan deziron veni. Ankaŭ mi tre deziris vidi lin inter la pasaĝeroj de la ŝipo "George Washington"...

La sama afero - pri mia amata rolulino Ludoĉka Ĉijeŝkaja. Fraŭlino kun tiu nomo vivis en realo. Ŝi efektive ravis la publikon per sia robo, prezentanta la ideon de Esperanto, en balo fine de 1910. Tiu balo tamen okazis ne en Peterburgo, sed en la suda urbo Derbent...

Mi devas fari unu plian gravan konfeson: la letero de Postnikov al ministro pri komerco, samkiel ĉiuj leteroj de la sekretaj agentoj-"ŝpikoj" estas mia fantaziaĵo. Ankaŭ la tri "nepublikitaj" poemoj de Vsevolod Lojko. Ĉiuj fontoj nomis lin poeto, sed mi ne trovis liajn poemojn, do devis elpensi ion proksiman al la stilo de tiu epoko...

Forgesu pri tiuj etaj trompoj. Mi sen hezito kaj sen troigo asertas, ke la romano estas historia.

Ne estis problemo atingi portretan similecon, ĉar mi havis diversajn fotojn de Zamenhof, kelkajn - de Postnikov... Pli malfacila tasko estis konstruo de la karakteroj, sed ankaŭ ĉe tiu tasko mi klopodis zorgi pri historia vero, uzante rememorojn de Aleksandr Saĥarov, publikajn paroladojn de la personoj kaj aliajn fontojn.

... La libro estis verkita en Esperanto kaj precipe por esperantistoj. Sed tiama lingvaĵo - rusa, angla, germana (ankaŭ esperanta, sendube) - grave diferencas de la nuntempa kaj estas frandinda tiagrade, ke mi tentiĝis montri al la legantaro abundajn citaĵojn en la aŭtentika aspekto. Provizante per Esperanta traduko, kompreneble. Indulgu min, ĉar ankaŭ en la teksto mem de la romano mi ne evitis diverslingvajn vortojn, eĉ frazojn. Ĉiujn mi opinias nepre bezonataj ĝuste en tiuj lokoj, kie ili estas metitaj; kompreneble, ĉiu ricevas tradukon kaj (ĉe bezono) klarigon piednote.

La sortojn de la roluloj mi travivis kun ili dum konsiderinte longa tempo, do nun mi kun bedaŭro, kun sopiro disiĝa adiaŭas ilin, prezentante la romanon por la juĝo de la legantoj

Tago unua

02.08.1910 Bremen, la ŝipo "George Washington"

--- Finfine, do, ni lasis la germanan bordon, kara Majstro! - entuziasme ekparolis svelta viro, kies eleganta civila surtuto apenaŭ povus kaŝi la staturon de oficiro. Lia vizaĝo glate razita, liaj okuloj, eĉ la nigraj lipharoj ellumis sinceran kontenton kaj ĝojon. — Finfine ankaŭ nia samideana ŝipanaro lasis vin, kara Majstro, en paco, - li daŭrigis.


— Nu, almenaŭ dume ili instaligās en siaj kajutoj, mi havas eblon proksimiĝi por saluti vin. Ja ni ne vidis unu la alian ekde aprilo, jes - lastfoje tio okazis finaprile en Peterburgo! Do, miajn sincerajn salutojn kaj gratulojn okaze de la komenco de nia navigado! ... Mi havas multajn gravegajn temojn por preparoli kun vi, kara... Ludovik Markoviĉ. Ĉu vi bonvolus oferi por mi iom da tempo dum nia ŝipvojaĝo? Mi komprenas, certe, ke ne mi sola petas vian tempon, sed...

— Kial ne, Aleksandr Aleksejeviĉ? -- respondis Zamenhof. — Mi jam planis miajn renkontojn kun sinjoro Mübs kaj kun sinjoro Pollen... estas ankaŭ aliaj. Sed mi scivolos pri viaj ideoj kaj planoj. Des pli, ĉar mi ne havis eblecon ĉeesti la Peterburgan kongreson ĝis la fino. Do, ni elektu la posttagmezan tempon, nu, eble de la tria... Ĉu vi konsentas? Bone... Ni danku la Dion, ke efektiviĝas tiu ĉi vojaĝo - ja, printempe mi havis sufiĉe da duboj pri la sorto de la Kongreso en Usono. Sed jen - ĉio estas en bona ordo, ni navigas kun bona vetero kaj havas tempon por preparoli niajn enlandajn aferojn, - li atente rigardis al Postnikov kaj, rimarkinte ion en ties miemo, aldonis, - ...kaj ne nur... Sed, por komenci - ĉu vi volus diri al mi, kia hundo trakturis inter vi kaj la moskvanoj? Ja vi scias tiujn — Riĉard Mencil, li estas studento de Moskva Universitato... ankaŭ mia "alma mater" - do, li skribas al mi pli-malpli ofte... saĝa knabo, iom tro persista. Doktoro Korzlnskij, tiu estas jam pli aĝa ol mi, prudenta persono. Tuj du, vi scias, certe, - mildadire ne tre ŝatas vin. Kaj eĉ Saĥarov Aleksandr Andrijeviĉ - tre tolerema persono - li ne skandalas, sed foj-foje plendas jen ke vi volas subpremi ĉiujn, jen ke vi nenion informas pri ilia agado en via gazeto...

— Ne estas absoluta vero. Liaj iniciatoj ricevas lokon sur la paĝoj de "Ruslanda Esperantisto".

Postnikov profunde enspiris la fumon kaj malrapide ellasis ĝin, rigardante ĉielon.

— Ah, tuj moskvanoj... Ili ĉiam grumbblas, ĉiam malkontentis. Mi ne vokas vin esti juĝanto, sed, Ludovik Markoviĉ, se por vi estas interese, mi diru mian opinion pri la situacio. Mi vidas, ke estas diversaj moskvanoj. Sinjoro Korzlnskij ne toleras min - mi ne komprenas lian teniĝon - sed estu lia afero... Ankaŭ Mencil... Apude estas aliaj - jen Titov el la sama Universitato — ni bone amikas. La profesoro Brandt. Mi scias, ke iam li faris sian lingvon...



Baĭlkova Anastasija [Tihvin, Rusio]

16.04.1911, Sankt-Peterburgo, Fortikaĵo de Petro kaj Paŭlo

Pordo de la ĉelo knaris abomeninde. Aleksandr aŭdis tiun ĉi sonon nur la duan fojon, kaj ĝi estis tute netolerebla.

— Vi devas ŝmiri per oleo tiun pordadon! - li kriis al la prizona gardisto.

— Eliru, via moŝto, - trankvile kun mokrideto respondis tiu. La esploristo vin invitas. La manojn transdorsen. Ek!

Ili eliris en la korton, kaj Aleksandr avide englutis la printempan aeron, levinte la kapon al la pura blua ĉielo. Feliĉaj frugilegoj jam finkonstruis siajn nestojn tie, en la arbokronoj, eble eĉ metis ovojn kaj nun grakis pace kaj kontente. "Sed mi kun Muza ne sukcesis fari la neston..." - Aleksandr pensis malgaje...

... — Haltu, via moŝto! — ordonis la gardisto kaj malfermis la pordon de la sesa kabineto. - Via ekscelenco, la arestito estas venigita!

— Bonan tagon, Aleksandr Aleksejeviĉ, bonan tagon! - ekaŭdis Aleksandr la konatan voĉon. Jen ni denove renkontiĝis - kiu estus supozinta antaŭ duonjaro...

— Bonan tagon, Pavel Antonoviĉ, - sarkasme respondis Postnikov. — Verŝajne mankas en la ŝtato gravaj krimuloj, se oni honorigis min per via esplorado.

— Sidiĝu, sidiĝu, Aleksandr Aleksejeviĉ! - afable invitis Aleksandrov, la juĝesploristo pri speciale gravaj kazoj. — Bedaŭrinde, ne mi decidis, kiu krimulo estas pli garva kaj kiu malpli...

— Do, oni tie, - Aleksandr levis la okulojn al la plafono, - opinias min tre grava krimulo. Ĉu vi bonvolus klarigi, Pavel Antonoviĉ, al kio mi ŝuldas tiom grandan homorigon?

— Ĉu vi mem ne havas ian supozon? - afable demandis Aleksandrov.

— Absolute ne havas, - Aleksandr respondis sincere.

— Ah, Aleksandr Aleksejeviĉ! - mire altiĝis la voĉo de Pavel Antonoviĉ. — Vi ne bonvolas atenti, des pli obei la konsilojn, kiujn donas al vi tute senpage gravaj personoj de la ŝtato. Esperanto estas lojaleca scienca afero... vi bone progresis, propagandante ĝin en la regno. Mi ne komprenas, kia bezono estis en la fondo de iu flanko, treege suspektinda organizajo...

— Pardonu min, via ekscelenco, - diris Aleksandr, sed, miaflanke, mi ne imagas, kial la nobla afero de mia "Universala ligo" tiom incitas ilin? Li denove montris per la okuloj supren.


... — Sed ni parolu ne pri via ŝatata "Ligo" Ĉu vi scias, pri kio vi estas akuzata?

— Ne, mi ne scias, - respondis Aleksandr, ekfumante.

— Do, mi tuj komuniku al vi, - diris Aleksandrov kaj ankaŭ prenis cigaredon.

— Vi estas arestita pro la suspekto pri perfido de la ŝtato.

— Absurdo, - diris Postnikov, ellasante fumrington. — Kaj vi scias, ke ĝi estas absoluta deliraĵo.



Eterna komencanta esperantisto Bill Pulov decidis restigi sian spuron en Esperantujo. Li longe pensadis, kiel tion fari. Iun sunan matenon al Bill venis tre bona ideo, kiu ŝangis tutan vivon de Bill.

Li diligente dum 35 jaroj abonadis la revuon "Komencanto". Ĉiam, kiam Bill ricevadis la vican numeron de "K", li legis ĝin dum tri-kvar tagoj de la komenco ĝis la fino, nepre kun vortaro. Por Bill la plej ŝatata paĝo de la revuo estis la lasta, ĉar de tie li ĉiam elskribadis multe da novaj adresoj de dezirantoj korespondi.

Poste Bill Pulov skribis al ĉiu nova adreso leteron, nepre kun helpo de ŝablonletero. Sendinte la leterojn, li forgesadis pri Esperanto ĝis tia momento, kiam la poŝtisto portis la vican numeron de "Komencanto". Sendube, Bill ricevadis la respondleterojn de la dezirantoj korespondi, sed dufoje al la sama adreso li neniam skribis. Post trarigardo ĉiu nova letero etis ŝovata en la ampleksan ŝrankon.

Por Bill estis vera leĝo – unu letero al unu adreso.

Post morto de Bill liaj amikoj longe miregis, ĉar ili trovis en lia ŝranko multe da leteroj de ĉiuj kontinentoj, el ĉiuj landoj, eĉ el Antarktido. La nombro de la leteroj estis pli ol du mil kvincent.

Karaj amikoj! Ne forgesu adeptojn de nia lingvo! Bill Pulov estis neordinara persono, kiu multe da fortoj fordonis al nobla ideo de Esperanto.

Estis li esperantisto.

Kurguzov Oleg

Esperantigis **Burgar Lilija**
[Volgodonsk, Rusio]

Kiu al kio similas?

La instruisto diris al ni:
"Ĉiu homo per sia sinteno similas al iu animalo. Unu estas mallaborema kiel, ekzemple, urso. Alia estas saltuleto kiel leporo. Ekprovu pentri proprajn gepatrojn en aspekto de simpatiaj bestoj. Tio estos bona ŝerco, ĝi gajigos viajn gepatrojn."

Kiam mi venis hejmen, paĉjo kuŝis sur la divano, legis ĵurnalon kaj oscedis.

Mi pentris lin kiel urson en ursokavo.

Ĵusmomente panjo revenis el vendejo kun pezaj sakoĵoj. Kaj mi pentris ŝin kiel kamelinon kun grandegaj pakajoĵoj.

Panjo kaj paĉjo ekrigardis miajn pentraĵojn kaj ekridis. Kaj poste panjo demandis:

— Ĉu vi pentris tion ĉi por lernejo?

— Certel- diris mi.- Ĝis tia hejmtasko por ni.

— Nu,- diris la paĉjo,- por kio do devualigi hejmajn sekretojn?! Pentru min – pli bone – en vido de kastoro, kiu senlace konstruas sian domon, kaj panjo estu senzorge fluganta birdeto.

Mi tiel faris: la paĉjon en vido de kastoro, la patrinon – kiel birdeton. Kaj fordonis la pentraĵojn al nia instruisto.

Tiam la paĉjon oni devigis al riparo de nia lernejo. Kaj la panjon oni devigis kanti en la lerneja gepatra horo. Bona ŝerco rezultigis!

Vronskij Dmitrij [Volgograd, Rusio]

Energiigo de vivo

Al mi iam ŝajnas, ke mia viv-sperto
Aspektas terura kvazaŭ vesperto:

Nek monan trezoron, nek belulinon,
Sed nur humileman atendon de l' fino

Mi scias havigi al mi kompatenda -
Kaj ne defendiva, kaj tro sen-defenda.

Ja tamen revenas al mi energio
Per nov-rememoroj pri nia socio:

Pri La Verda Lingvo kaj pri homoj karaj,
Pri la renkontigoj en teroj tendaraj -

Kaj ree la vivo odoras malvanta,
Kaj ree mi sentas min batalanto

Por Verda Popolo kun verda espero
Pri la inter-frata pacigo de l' Tero!

Por l' verda ide' estas plen-dediĉita
La viv' novigita, la viv' relanĉita.

Pasio

Unu rusa humoristo diris,
Ke vira pasio estas io simila
Al nostalgio pri virina sino
Iam lasita.

Kaj mi opinias, ke vera vira pasio
Estas frida glacio,
Kiu sorbis brulaĵon avian,
Do komence racia kaj plene konscia
Bruligite prezentas ĝi furiegon sian.

Pri hardadoj

Kiel oni povas hardi ŝtalon?
En komenco per varmego ĝin ardigas.
Poste penas rompi ĝian formon
Per pezega sia martelego.
Kaj fin-fine degeligas ĝian brilon
Per dronigo en lacigan vinon -
Kaj rigardas, ĉu ĝi neniĝis.

Oni hardas homon ĝuste same.


Santi Elena Bullo [Mestre-Venecio, Italio]

Harmonio

De nova mateno
Kiu naskiĝas de la nebuloj
D' ankoraŭ malvarma nokto
Tuj estis hela la ĉielo

De trankvila sunsubiro
Etendiĝas la ruĝo de la ĉielo...
Respeguliĝas en la akvo
Per la lastaj brilegoj.

De venanta vespero
Malrapide dispeciĝas la koloro
De la cirklo en la nebulo
Kiu malpeza ĉion envolvas.
Estos nokto ne longe.



Všivceva Galina [Miass, Rusio]

Bonaj konsiloj al lernantoj de Esperanto

Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

Korespondu!

Tuj post la unuaj trastuditaj lecionoj de Esperanto trovu literamikojn en – kaj eksterlande. La leterverkado estas tre taŭga rimedo por lingvopraktiko kaj rapide pliriĝigos vian aktivan vortprovizon. Sukcesaj korespondligoj (paperpoŝtaj aŭ interretaj) premisos ankaŭ bonajn amikajn kaj personajn kontaktojn kaj pli intime konatigos vin kun alilandaj kutimoj kaj moroj, senpere identigos al vi elementojn de alinaciaj kulturoj.

Pensu!

Eklerante Esperanton, devigu vin tuj pensi en ĉi tiu lingvo. Tio ne egalas al la pensado en la gepatra lingvo kun posta enkapa interpreto de viaj pensoj en Esperanton. Se vi dum lecionoj aŭ memstaraj lingvookupoj penos ne uzi vortojn el la gepatra lingvo, vi pli rapide perfektigos en Esperanto. Por pli efika progreso en via lernado pensu en Esperanto!

Aŭskultu!

Ekkonu la lingvon unue per la aŭdado. Atente aŭskultu spertajn esperantistojn kaj diversnaciajn paroli en Esperanto, atentu specifojn de ilia prononcado. Aŭskultu kompaktdiskojn, magnetofonajn registraĵojn, radion, spektu videofilmojn. De nun strebu esti tre atenta aŭskultanto!

Komunikiĝu!

Partoprenu klubkunvenojn, renkontiĝojn, kongresojn, turistajn vojaĝojn kaj provu aktive kaj kuraĝe konversacii kun novaj homoj. Ne afliktiĝu pro eblaj eraroj, ĉar en tiu ĉi etapo pli gravas kaj valoras ne viaj gramatikaj scioj, sed via deziro interligiĝi pere de Esperanto. Ne ĝenu fari demandojn al spertuloj pri nekonataj vortoj aŭ lingvaj problemoj. Ju pli rapide vi trairos la psikologian barieron de necerteco, des pli rapide kaj sukcese vi adaptigos en la esperantista medio.

Ripetu!

Konstante ripetu vortojn, vortkombinojn kaj frazojn ĝis ili en necesa kazo aŭtomate reaparados en via kapo.

Vi majstras vin en nova, kvankam interesa kaj loga, sed ĝis nun nekonata fako, tial vi devas perfektigi ripetante multfoje la saman ĝis ĝia senpera alproprigo, kiel ekzemple naĝisto revanta pri furora sukceso ŝvite kaj rutine milfoje praktikas unu kaj la saman movon dum sia trejnado.

Legu!


Legu diversspecajn tekstojn, revuojn, beletrajn kaj fakajn librojn en Esperanto, el kiuj vi ĉerpos ne nur lingvosistemajn sciojn, sed ankaŭ variajn informojn pri reala vivo de la esperantista komunumo. Legante en Esperanto provu ĉiam parkere lerni tekstopecojn prozajn kaj poeziajn aŭ rerakonti ilin.

Ne kontraŭstaru!

Ne kontraŭstaru la regulojn de Esperanto sed cedu al ili. Esperanto estas elprovita kaj komunike realigita lingvo kun propraj reguloj. Komence vi supozos, ke en via denaska lingvo la reguloj estas plej raciaj, sed se vi penos meti la esperantajn regulojn en la kadrojn de via propra gepatra lingvo, vi vane kaj senfrukte perdos fortojn.

Imitu!

Praktiku voĉan elparolon de sonoj en Esperanto. Speciale atentu tiujn sonojn, kiuj mankas en via gepatra lingvo. Imitu modelan intonacion de spertaj Esperanto-parolantoj. Parolu ĉiam klare kaj bele, por ke via prononco akumulu imitindajn internacie akceptitajn trajtojn.



Kornjuĥina Anna [Novoaltajsk, Rusio]

LINGVAJ RESPONDOJ L. L. Zamenhof

Pri la
participo-substantivo

Participo-substantivo en Esperanto signifas ordinare personon (aŭ objekton, kiu plenumas ian funkcion); se ni deziras doni al la participo alian sencon, ni devas uzi sufikson (ekzemple *aj* aŭ *ec*). Tial, laŭ mia opinio, la vorto “estonto” povas signifi nur “estonta persono”, sed ĝi ne povas signifi “estonta tempo” aŭ “estonta afero”, kiujn mi rekomendus traduki per la vortoj “estonteco” kaj “estontaĵo”.

Respondo 46, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p.291

“Okupita” aŭ “Okupata”

Kiam pro la laboro mi ne estas libera, mi diras ordinare “mi estas okupita”. Kelkaj personoj trovas, ke tio estas neĝusta; ke ĉar mi parolas pri laboro, kiu daŭras nun, mi devas diri “okupata”. Kelkfoje ŝajnis al mi, ke tiuj personoj estas pravaj, kaj tiam mi provis uzi “mi estas okupata”; mi tamen tuj forĵetis tiun formon, kontraŭ kiu protestis mia lingva sento.

Ĉu ni devas uzi en tiu esprimo la pasivon nuntempa aŭ pasintan, pri tio la lingvoj franca kaj angla ne povas doni al ni respondon, ĉar ili ne havas apartajn formojn por tiuj ambaŭ pasivoj; sed la lingvoj slava kaj germana uzas en la dirita okazo la pasivon *pasintan*, sekve ĉi tio estas jam sufiĉe grava motivo, por ke ankaŭ en Esperanto ni tiel agu.

Sed eble la formo estas kontraŭ logika? Ne. Se iu ion okupas, (en la senco “prenas en posedon”), tiam en tiu momento la io estas okupata de la iu; ekzemple kiam la malamikoj okupas nian urbon, ĝi estas en tiu momento okupata de ili; se mi estis tute libera, sed en la nuna momento oni donas al mi ian laboron, kiu min ekokupas, mi povas diri, ke mi estas nun okupata de tiu laboro, t.e. ĝi forprenas en sian posedon mian tempon; sed se mi parolas pri laboroj, kiuj estis donitaj al mi jam antaŭe t.e. se mi parolas ne pri la ago de ekokupo mem, sed pri la stato, en kiu mi troviĝas, tiam mi devas diri “mi estas okupita”. Estas vero, ke transformante la pasivan formon de la citita frazo en aktivan, ni ofte uzas la formon *nuntempa* (“laboroj min tre okupas”), sed tion ni faras por tio, ke la formo “okupis” ne pensigu, ke mia okupiteco jam pasis.

En la *pasiva* formo ni ne bezonas timi tiun malkompreniĝon, ĉar “mi estas okupita” montras, ke io min okupis kaj la okupiteco ankoraŭ daŭras.

La senco de “okupi” havas du nuancojn: *preni* en posedon kaj *teni* en posedo; per la formo “mi estas okupita” ni esprimas samtempe *ambaŭ* nuancojn, dum la formo “mi estas okupata” esprimus nur la *unuan* nuancon.

Cetera pri la vorto “okupi” mi devas ripeti tion, kion mi diris pri multaj aliaj lingvaj demandoj; ĉiufoje, kiam la logiko ne donas al ni la respondon tute klaran kaj senduban, kiu ne ofendus nian lingvan senton, ni devas peni konformigi nin al la ekzistantaj *kutimoj*; kaj la kutimo de la popoloj, kiel mi supre montris, postulas, ke ni diru “mi estas okupita”.

Respondo 48, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p.293

Pri la participa sufikso antaŭ
verba finiĝo

La formoj “amatas”, “amitas” k.t.p. anstataŭ “estas amata”, “estas amita”, per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon en tia okazo, se *as*, *is*, k.t.p. signifus “estas”, “estis”; sed kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo “esti”, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas.

Respondo 15, *La Revuo*, 1907, Aprilo


Pro la infinitivo en
kelkaj specialaj okazoj

Kiel mi diris “mi vidis lin sana” (=“ke li estas sana”) — tiel laŭ mia opinio ni povas ankaŭ diri “mi vidis lin kura” (=“ke li kuras”), “mi aŭdis lin paroli” (=“ke li parolas”); sed la esprimojn “li faris ĉion sen ridi” aŭ “li restis du tagojn sen manĝi” mi ne konsilus al vi uzi.

Prepozicio antaŭ verbo mi konsilus uzi nur en okazo de *neceseco*, se alie ni povas bone esprimi nian penson. Sed anstataŭ “sen ridi” aŭ “sen manĝi” ni povas ja tre bone diri “sen ridi”, “sen manĝo” aŭ “neniom ridante”, “neniom manĝante”.

respondo 20, *La Revuo*, 1907, Junio

Tempo kaj homoj



Kaptu la tempon!

Všivceva Galina [Miass, Rusio]

Elektis kaj esperantigis por la rubriko **Kalačova Anastasija** [Kichera, Rusio]

Leonid Jengibarov

Mia konatulino

Al mia konatulino de la tria enirejo de nia domo estas ses jaroj.

— Ĉu vi scias, - diris ŝi al mi foje matene, — nia domo similas al buterpano.

Mi rigardis al la surtera etaĝo, kie estis vendejŝildo “Pano”, kaj konsentis.

— Nu, sed la aliaj naŭ etaĝoj estas kio? – decidis ĝustigi mi.

Evidentiĝis, ke naŭ etaĝoj tio estas — fromaĝo, kolbaso, pasteĉo kaj tiel plu, depende de tio, kion sur kiu etaĝo oni manĝas por matenmanĝo.

Al la domo-buterbano alveturis aŭto kun la ŝildo “Lakto”.

La mateno de la vivo. Ĉio ŝajnas bongusta.

Kaj subite al mi iĝis honte, ke mi tiom multe forgesis.

Mi saltetis iomete sur unu piedo kun mia juna konatulino sur asfalto kaj kun apetito iris al la laborejo.

Dmitrij Liĥaĉer

El libro

“Rimarkoj kaj observoj”

Kun la naskiĝo de homo samtempe naskiĝas lia tempo. En la juneco ĝi estas juna kaj fluas juneco – ŝajnas rapida en kurtaj distancoj kaj longa en la grandaj.

En maljuneco tempo kvazaŭ staras. Ĝi estas malenergia. Pasinteco en la maljuneco estas tute proksime, precipe la infaneco. Generale, el la tri periodoj de la homa vivo (infaneco kaj juneco, maturaj jaroj, maljuneco) la maljuneco estas la plej longa periodo kaj la plej enua.

Neelpensitaj historioj

David Henderson [Usono]

Trinku teon - estu sana!

Antaŭ kelkaj someroj, mi kaj mia amiko Karsono biciklis tra la bela Kaskada montara regiono por postlasi siajn okupitajn urbegajn vivojn. Post multaj krutaj deklivoj, ni laciĝis kaj elektis dormi en kampadejo, kiu situis en verda valo.

La sekvantan matenon ni sidis en apuda kampara manĝejo ĉe unu el multaj tabloj. Aperis ne pli ol dek du jara knabino de proprietulo kun levita kraĵono. Ŝajnis al ni, ke ŝi klare frandis la rolon de helpema kelnerino.

Karsono demandis ŝin, "Kia teo estas havebla?" Ni atendis la kutiman liston de senkafeinaj, mentaj, herbaj, verdaj kaj nigraj teoj, ktp. Anstataŭe, per vigla pepada voĉo, ŝi sincere proklamis:

"Ni havas DU specojn de teo, varma ... kaj ... glacia!"

Esperantigis **Ginette Martin**
[Saulxures-sur-Moselotte, Francio]

Mi ricevis antaŭ kelka tempo tiun mesaĝon. kaj ĝi tiom amuzis min. ke mi tradukis ĝin por "K".

La monato de la belaj virinoj

Ĉu vi scias ke ni estas nun en la monato de la belaj virinoj? Nu, estas tiel kaj kiam oni diras "belaj virinoj" tio signifas — vi kaj mi. Jes, ĉar mi devas sendi tiun mesaĝon al kvin belaj virinoj, kaj vi estas unu el ili.

Kelkaj faktoj:

Ekzistas tri miliardoj da virinoj, kiuj ne similas mod-stelulinojn, kaj nur ok, kiuj similas ilin.

Marilyn Monroe havis la tajlan numeron 14.

Se *Barbie* estus reala, ŝi devus marŝi sur siaj kvar piedoj laŭ siaj proporcioj.

La averaĝa virino pezas 72 kilogramojn kaj aĉetas vestojn en la numeroj 12-14.

En mezlemcoj, unu knabino el 4 havas nutrad-problemon.

La maneken-virinoj en revuoj estas false aranĝitaj-ne perfektaj.

Psikologia sondado en 1995 elmontris ke rigardi dum tri minutoj magazinon pri modo kaj beleco estigas deprimon, kulpo-senton kaj embarason ĉe 70% de la virinoj.

La mod-stelulinoj de antaŭ 20 jaroj pezis je 8% malpli ol la averaĝaj virinoj. Hodiaŭ tio estas 23% malpli.

La beleco de virino ne kuŝas en la portitaj vestoj, nek en la aspekto kiun ŝi montras, nek en la maniero aranĝi la hararon.

La beleco de virino devus esti rigardata tra ŝiaj okuloj, ĉar ili estas la enirpordo al ŝia koro, kie amo regas.

La beleco de virino ne estas ekstera ŝelo, sed ĝi speguliĝas en ŝia animo.

Ĝi estas la havaĵo, kiun ŝi donas ame, la pasio kiun ŝi elmontras.

La beleco de virino, dum la pasantaj jaroj, nur kreskas.

Instruisto pri la angla lingvo skribis sur la tabulon: "Woman without her man is nothing" kaj petis ke la studentoj metu bone la interpunkciojn.

Viroj skribis: "Woman, without her man, is nothing" (Virino, sen sia viro, estas nenio)

Virinoj skribis: "Woman! Without her, man is nothing" (Virino! Sen ŝi, viro estas nenio)

(Tuj konfuzoj ne estus eblaj en esperanto, kiu estas preciza lingvo. Ili eblas en la angla, kie "sia", "ŝia" kaj "ŝi (komplemento)" tradukiĝas per la sama vorto "her".)

...

Mi amas vin, inoj, ĉefe ne ŝanĝiĝu!



Santi Elena Bullo [Mestre-Ve, Italio]

En ĉiu bona anekdoto estas aforismo, kaj ĉiu bona aforismo jam estas anekdoto
(Stas Jankovskij)

AFORISMOJ



Vinnikova Nina [Novoaltajsk, Rusio]

Aristotelo

antikva greka filozofa kaj sciencisto, (384-322 j.j. a.n.e.) granda fakulo pri logiko

Bona komenco estas pli ol duono.
*

Amikeco estas la plej necesa por vivo, ĉar neniu deziras al si vivon sen amikoj, eĉ se li havas ĉiujn ceterajn havaĵojn.
*

Malbonas multpotenco – nur unu estu la potenculo.
*

Al ni estas bone iam, al la Dio – ĉiam.
*

La plejparto de tiranoj aperis, cetere, el demagogoj, kiuj gajnis kredon de la popolo per tio, ke mensogis pri la riculoj kaj potenculoj.
*

Feliĉo estas kun tiu, kiu kontentas.
*

Por fari bonon, antaŭ ĉio necesas ĝin havi.
*

Por sukcesi, necesas konsideri tiujn, kiuj estas antaŭe kaj ne atendi tiujn, kiuj estas malantaŭe.
*

Celo de milito estas paco.

Yves Brusq
[Douarnenez, Francio]

Profundaj pensadoj
de Doktoro Karpusta
profesoro ĉe la
Universitato de Freneszurbo

Ĉu necesas, ke krajono havu du pintojn, ja ĉiam estas unu, kiu ne utilas?

•
La soleco estas eltenecbla ekskluzive je multope.

•
Ne necesas esperi por entrepreni, nek sukcesi por persisti.

•
La silento malaperas, kiam oni nomas ĝin.

Aforismoj pri logiko

Logiko estas anatomio de pensado.

Ghon Lokk

*

Logiko estas arto erari kun plena vero.

D.V. Krauch

*

Logiko estas kateno de fantazio.

Jl. Nar

*

Logiko estas ŝranko, en kiu kuŝas kelkaj utilaj objektoj kaj amaso da malutilaj.

Ĉ.K.Kelton

*

Plej bona defendo kontraŭ logiko estas malklereco.

K. Olbran

*

Stulteco ordinare estas tre logika.

H. Shtejnhaus

*

Ajna ĝeneraligo estas malvera, ankaŭ tiu ĉi.

N.V.

*

Se okazos, ke nia logiko estas ne vera, ĉiuj sciencoj iĝos poezio.

Stanislav Je. Lec

*

Estus ege nelogike sekvi en la vivo *nur* laŭ logiko.

L. Kumor

Proverboj

Mankas logiko en via kokeriko.

*

Ne kreskas brasiko sur muro brika.

*

Venis kritiko al via logiko.

ANEKDOTOJ

Yves Brusq
[Douarnenes, Francio]

Klarvidanto ekzamenas la manon de sia kliento kaj diras al li:

--- Vi estos buĉota, tranĉota po-pece, poste kuirita kaj manĝota.

La kliento rimarkas:

— Ĉu mi povas demeti mian ganton? Ĉi estas el porkhaŭto.

*

Ernesto, elirante el la restoracio renkontas Vincenton, kiu eliras el la sama ejo.

— Ho, Vincento! Ĉu ankaŭ vi manĝis ĉi tie?

— Jes. Foj-foje mi venas ĉi tien. Oni bone manĝigas en tiu ĉi domo. Kion vi manĝis?

— Langon kun Madejra saŭco.

— Fi! Mi ne povas manĝi tion, kio venas el la buŝo de la bestoj.

--- Ha! Kion vi manĝis, do?

— Du ovojn.

ANONCOJ

“Senatentulo demandas al ĉiuj, kiuj ne respondis al li: ne mal-trankviliĝu -- li forgesis anonci.”

*

“Juna lernanto aĉetus hindian Diin-statueton por lerni kalkuli ĝis dek per ĝiaj fingroj.”

Lilija Burgar [Volgodonsk, Rusio]

— Avo, ĉu vi estis juna?

— Jes, nepo, estis.

— Nu, mi imagas, kiel ridegis viaj amikoj okaze de viaj barbo kaj kalvaĵo!

— Mia kara onklo, grandan dankon pro la trumpeto, kiun vi al mi donacis!

— Ne dankinde. Ĝi kostis nur sesdek rublojn.

— Sed tamen ĉiumatene la patro kaj ĉiuvespere la patrino donas al mi po dek rublojn por ke mi ne trumpetu!

Laŭteme kolektis kaj esperantigis **Ivan Telešov** [Ozernij, Rusio]

Anekdotoj pri logiko kaj senlogiko

Kliento en kafejo dekomence prenis sendviĉon, kaj poste repensis kaj redonis la sendviĉon kaj ŝanĝis ĝin kontraŭ taso de kafo. Fin-trinkinte la kafon li iris al la pordo, ne paginte, tie lin kaptis kelnero.

--- S-ro, vi ne pripagis vian kafon.

--- Sed mi prenis ĝin kontraŭ sendviĉo, kiun mi redonis.

— Sed vi ja pro la sendviĉo ne pagis.

— Sed mi ja ne manĝis ĝin!

*

En la Brita Parlamento unu el la parlamentanoj ekstaras kaj krias:

--- Duono de la ĉeestantoj ĉi tie estas friponoj kaj ŝtelistoj!

La gvidanto:

— Tuj reprenu viajn vortojn!

La parlamentano trankvile:

--- Bone. Duono de la ĉeestantoj ĉi tie ne estas friponoj kaj ŝtelistoj.

*

Homo kun valizo demandas:

--- Se mi iros laŭ tiu ĉi strato, tie estos fervoja stacidomo?

--- Ĝi estos tie, ĉe se vi ne iros laŭ tiu ĉi strato.

Maljunulo diktas sian testamenton:

— Al la edzino 100000 rubloj. Al la filo -- 50000 rubloj. Al la filino -- 50000 rubloj... Diable, kie mi prenos tiom da mono?!

*

La edzino plendas al la edzo pri la konduto de la filo:

— Li iĝis tute netolerebla. Atentas konsilojn nur de diversaj idiotoj. Parolu kun li, mi petas.

*

La edzino al la edzo:

— Vi estas idioto, idioto kaj refoje idioto. Ĉion vi faras kiel idioto kaj respondas kiel idioto. En la konkurso de idiotoj vi gajnis la duan lokon.

— Kial la duan?

--- Ĉar vi estas idioto!


*

Estro de futbala klubo invitas al si unu el siaj futbalistoj kaj anoncas:

— Vi tre bone ludis en pasintaj sportaj konkuroj, ni decidis plialtigi vian salajron je triono!

— Mi ne konsentas, ne malpli ol je kvarono! -- respondas la futbalisto.

Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]



Karj amikoj!


Ĉi-foje ni proponas al vi distri sin per diversspecaj enigmoj kaj rebusoj. Logiko jen estas ŝlosilo por trovi la solvojn de ĉiuj enigmoj. Tiel ni daŭrigas nian ĝeneralan temon kaj petas vin sendi al la redakcio viajn respondojn al ĉiuj subaj taskoj.

Krucvortenigmo "Araneo"

Kompilis Alikin Viktor [Permj. Rusio]

Ĉiuj vortoj havas 5 literojn kaj finiĝas per "o". Vi tralegos en unu el la vicoj (laŭ horloĝa turndirekto) konatan proverbon, se korekte enskribos ĉiujn vortojn.

1. Loĝanto de Britaj insuloj.
2. Altaĵo.
3. Hejma naĝbirdo.
4. Kemia elemento In.
5. Ĉio, kio ĉirkaŭas nin.
6. Ĝardeno, kien Dio lokigis Adamon kaj Eva.
7. Poem-verkisto.
8. Parenco.
9. Hom-grupo kun samaj distingaj trajtoj.
10. Ĉiela korp-formo: stelo, kometo.
11. Grupo de kunludantoj.
12. Terkolo.
13. Kondiĉa esperanta monunujo.
14. Aparta grupiĝo de eklezio au partio
15. La ŝipo de Noa la Biblia.
16. Geometria figuro.
17. Trakolarĝo.
18. Longa armilo kun unutanĉa klingo.



Estu atenta kaj pensu logike




- 1
Al kiu demando neniu iam respondos "jes"?
- 2
En kiu okazo 6 infanoj, 2 hundoj 4 plenaĝaj homoj neniam malsekiĝos sub la ordinara ombrelo?
- 3
Kiam kaprino iĝos 7-jara, kio okazos plu?
- 4
En la kandelingo brulis kvin kandeloj, tri el ili estingiĝis. Kiom da kandeloj restis?
- 5
Se en la 12-a horo nokte pluvas, ĉu oni povas esperi, ke post 72 horoj venos la suna vetero?
- 6
Bv nomi kvin tagojn, ne nomante nombrojn (ekz. 1, 2, 3, 4, 5) aŭ nomojn de tagoj (lundo, mardo ktp).
- 7
Kiam por la nigra kato estas pli facile penetri en la domon?
- 8
Unu trajno iras el Moskvo al S.Peterburgo kun malfruĝo je 10 minutoj, kaj la alia el S-Peterburbo al Moskvo kun malfruĝo je 20 minutoj. Kiu el tiuj trajnoj okazos pli proksime al Moskvo, kiam ili renkontiĝos?
- 9
En la 12-etaĝa domo estas lifto. Sur la dua etaĝo loĝas nur 2 homoj. De etaĝo al etaĝo la kvanto de la loĝantoj plimultiĝas je dufoje. Kiun butonon en la lifto de tiu domo oni premas pli ofte?
- 10
Apud bordo staras ŝipo, de ĝia ferdeko estas pendigita la ŝnura ŝtupetaro. La ŝtupetaro havas 10 ŝtupojn. Distanco inter la ŝtupoj estas 30 cm. La plej malsupra ŝtupo tuŝas la akvan surfaceton. Komenciĝas tajdo, kiu levas la nivelon de akvo je 15 cm/hore. Post kiom da tempo la tria ŝtupo kovriĝos per akvo?

Divenu kaj respondu

1. Kio estas uzebla nur post sia rompigo?
2. Kio estas tio, kio apartenas al vi, tamen estas multe pli ofte uzata de aliaj ol vi mem?
3. Kio restas ankoraŭ ĉe angulo post vojaĝo tra la mondo?
4. Kiu besto kuŝas, staras kaj iras ĉiam en sida pozo?
5. Kiu besto sidas, staras kaj iras ĉiam en kuŝa pozo?

Por ĉiu besto sia nesto

Sep bestoj estas en cirko.
Faru tri rektajn liniojn por apartigi ilin unu de alia.



Bill Thorne



RIMARO


INO

aspirino
ĉino
destino
disciplino
fino
ĝino
kantino
kazino
kino
krinolino
kulmino
maŝino
mino
muslino
nikotino
origino
pino
rezino
sino
skarlatino
spino
vino
virino
vitriino
zepelino


Alumetoj

4 el 16


Translokigu 4 alumetojn el 16 tiel, ke rezultigu 3 kvadratoj

3 el 12

Translokigu 3 alumetojn el 12 tiel, ke rezultigu 4 tute samaj kvadratoj.

Ne tuŝu alumetojn!

Korektu la egalaĵon tiel, ke ĝi iĝu vera, ne tuŝante eĉ unu el la alumetoj (ne eblas bruligi, movigi ktp)



Karaj amikoj! Ni atendas de vi respondojn kun solvoj de tiuj enigmoj. Ni publikigos nomoj de ĉiuj, kiuj sendos al ni korektajn respondojn.

la redakcio.

En "K"-2004, p.3 en materialo pri Osmo Buller dum transiro el la reta "x" sistemo al la ĉapelitaj literoj aperis tajperaro. Anstataŭ organizaĉo oni legu organizaĵo. La redakcio petas pardonon ĉe la aŭtoro kaj ĉe la legantoj!

IPO

disipo
gripo
lipo
pipo
principo
ripo
slipo
ŝipo
tipo
tulipo
vipo

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi deziras interkorespondi per paper-poŝto.
Mia adreso estas:

Paulo de Souza
Rua Dom Nery, 324 -
Centro Pouso Alegre,
M.G. 37.550-000

Brasilio

Mi estas komencanto dez. kor. por plibonigi mian E-ton. Int: birdobservado, piedekskursi, muziko.

s-ro *Thierry Tailhades*
61 rue Henri Gorjus
69004 Lyon,

Francio

thierry.tailhades@wanadoo.fr

22-jara komencanto deziras korespondi tutmonde por plibonigi sian E-ton.

Dogadin Dmitrij
bv. Engelsa, 29-- 154
Volgograd
RU-400026

Rusio

35-jara ed./o. komencanto, pri lingvoj, komputiloj, scienco, biciklado, azia kuirarto.

Bert Klijn
Klipper 119,
1721 GW Langedijk,

Nederlando

<bertmarian@hetnet.nl>

Internacia koresponda Adresaro

Vi povas korespondi kun amikoj de la tuta mondo. La adreslisto enhavas pli ol 200 adresojn el pli ol 40 landoj. Sendu vian adreson kun viaj temoj por korespondado -- ĝi aldoniĝos al la listo tute senpage.

Por ricevi la liston aldonu 2 IRK aŭ 1 ĉiron

Lazaro Azcuy
Apartado Postal 3026
Habana 13, CP-11300
La Habana.

Kubo

Kontaktoj kun esperantistoj el la tuta mondo serĉas 56 jara kollektanto de telefonaj kartoj

Vladimir Pys
Trachovec 3013
OSTRAVA-Martinov
CR --- 723 00

**Ĉeska
Republika**

Mi estas 30 jara komencanto, sciencisto pri la medicino de la cerbo Int: naturo, biologio, historio, kulturo kaj lingvoj.

Dr Dallas Jason Grashy
4 Francis St
Bedford Park, 5042
Suda Aŭstralio

Aŭstralio

dgrasby@arcom.com.au



Dalmatova Daŝa [Jelec. Rusio]

Karaj Samideanoj,

Mi prezentas NEK -- Niĝerlandan Esperant-Klubon. Mi instruas la novajn klubanojn en la lando Niĝero. Ni kunvenas kaj babilas pri diversaj temoj. Ni kredas ke Esperanto povas kunigi ĉiujn popolojn en la mondo. Ni volas korespondi kaj prezenti nian landon, kie estas multaj mirindaĵoj. Nun, por plibonigi niajn lingvosociojn la klubanoj deziras kontakti kun aliaj esperantistoj tra la mondo, korespondi kaj amikiĝi. Skribu al nomo de la klubestro:

CLUSE Florent
S/C Kossi Kodjo MEDUWODJI
BP: 10951 Niamey-Niger

Niĝerlandano

32-jara francano korespondus kun Islandan-Finlandan-Kebekan-Kolombian-Baltan-Usonan(in)oj. Intereso: poemi, pentri, legi literaturon, aŭskulti muzikon, mediti en la naturo, legi runojn...

Frederic Meconte
<itrikanen-milid-amilendal@ifrance.com>

Kolektas filatelajojn esperantaj kiel ekzemple: uzitajn kaj neuzitajn poŝtmarkojn pri temo Esperanto, E-bildkartojn, aliajn E-eldonajojn okaze de Universalaj Kongresoj, ktp ks.

Piotr Smigiel
ul. Bronikowskiego 3 m.2,
PL-85426
Bydgoszcz

Pollando

36-jara filozofistudentino, komencanto. Min interesas *Martinus-kosmologio*, vojaĝoj, kulturoj, montpromenoj.

Renee Aagesen
Myrvejen 17,
9020 Tromsøen

Norvegio

komencanto@r66.ru

http://Komencanto.narod.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

